

### 3

## *Neekspektita Revido*

**T**iutempe la atento de la registaro en Vaŝingtono estis direktata al la sudo, al Meksikujo. Estis la tempo, en kiu la lando ankoraŭ suferis pri la sango-fluigajn tumultojn de la batalo inter la respubliko kaj la imperia rego.

Benito Juárez estis agnoskiita de la Unuiĝintaj Ŝtatoj kiel prezidanto de la Respubliko de Meksikujo, kaj la Ŝtatoj arde refuzis rezigni pri li kontraŭ Maximilian. Ili konsideris la imperiestron esti fremda invadinto, kaj komencis fari tiun premumon al Napoléon III<sup>a</sup>, kiu fine igis lin reeniri siajn trupojn el Meksikujo.

Teksaso deklaris sin pro la ‚secesio‘ je la ekkomenco de la civita milito, kaj estis sin metinta tiel sur la flankon de la sklavecaj ŝtatoj. La venko de tiuj sed tute ne kaŭzis rapidan kvietigon de la popolo. Oni koleris kontraŭ la nordo, kaj tial kondukis malamikece kontraŭ ĝia politiko. Ĝenerale la loĝantoj de Teksaso havis bonan respublikan pensmanieron. Oni arde ŝatis Juárez-on, la ‚indianan heroon‘, kiu ne estis malkuraĝinta ribeli kontraŭ Napoléon kaj la ido de tiel forta dinastio, kiel tiu de la Habsburgoj. Sed ĉar la registaro de Vaŝingtono prois pro tiu ‚heroo‘, oni kaŝe konspiris kontraŭ li. Tiel estiĝis profunda fendaĵo de opinioj inter la loĝantoj de Teksaso. Unu partio malkaŝe prois pro Juárez, la aliaj deklaris sin kontraŭ li, ne per konvinko, sed per malsimpatio pri la nordaj ŝtatoj. Konsekvence de tiu fendaĵo ne estis simple vojaĝi tra la lando. Ĉiu gardiĝo de individuo kaŝi sian politikan opinionon, estis vana. Oni estis fakte devigita montri ĝin malkaŝe.

La en Teksaso loĝantaj germanoj mem havis tian fendaĵon. Kiel germanoj, ili inklinitis al Maximilian, sed aliflanke li ne vere estis lia heroo, ĉar li estis veninta al Meksikujo sub la gardo de Napoléon. Ili estis enspirintaj sufiĉe da respublika aero, pro

senti, ke la invado de la francoj en la landon de Montezuma estis nerajtigita, kaj estis estinta nur rimedo deflankigi la vidon de la francoj for de la malbonstato en la hejmlando, per refreŝigo de la franca *„gloire“*.

Pro tiu kaŭzo la germanoj kondukis kviete, kaj fortendiĝis de ĉiu politika deklaro, des pli multe, ĉar ili estis estinta dum la secesia milito sur la flanko de la nordaj ŝtatoj kontraŭ la sklavestroj.

Tiaj estis la cirkonstancoj, kiam ni ekvidis la malaltan, longan terlangon, kiu disigas la Matagorda:n golfeton de la meksika golfo. Ni enveladis tra la Paso Caballo, sed tiam devis subite faligi la ankrojn, ĉar la golfeto estas tiel malprofunda, ke ŝipoj, kiuj iĝas profunde en la akvon, facile endanĝeriĝas grundi.

Malantaŭ la terlango ankris pli malgrandaj ŝipoj, antaŭ ĝi, sur la maro, kelkaj pli grandaj, trimastuloj kaj ankaŭ vaporŝipo. Mi lasis min remi tuj al Matagorda, pro demandi, ĉu tie estis ebleco baldaŭ pluvojaĝi al Quintana. Bedaŭrinde mi aŭdis, ke nur post du plenaj tagoj skuno iris tien. Mi do estis nmovebla, kaj tio ĉagrenis min, ĉar Gibson nun supozeble ricevis antaŭecon de kvar tagoj, kiun li povis uzi malaperi senspure.

Mi nur havis tiun konsolon, ke mi estis farinta ĉion, kio eblis en la nunaj cirkonstancoj.

Ĉar ne restis io farenda al mi krom pacience atendi, mi elektis gastejon, kaj lasis mian bagaĵon alporti de la ŝipo.

Matagorda tiutempe estis pli malgranda urbo ol hodiaŭ. Ĝi situas en la orienta parto de la golfo kaj estas kiel haveno multe malpli grava ol ekzemple Galveston. Kie ĉie en Teksaso, ankaŭ tie la bordo estis ŝipdanĝera malkrutaĵo, kiu ja ne estas marĉa, sed tamen tre akvoriĉa. Oni povas ekhavi la febron tie facile, kaj tial ĝi ne plaĉis al mi devi resti tie longe.

Mia ‚hotelo‘ egalas al tria- aŭ kvararanga germana gastejo, mia ĉambro al kajuto, kaj la lito estis tiel mallonga, ke mi devis elpendigi aŭ la kapon aŭ la kruojn.

Post miaj aĵoj estis enĉambrigitaj, mi eliris pro rigardi la urbeton. Kiam mi paŝis el mia ĉambro, mi devis, pro atingi la ŝtuparon, pasi pordon, kiu ĵus estis malferma. Mi videtis en tiun ĉambron, kaj eksciis, ke ĝi estis same ekipita kiel mia. Je la muro kuŝis selo sur la tero, kaj bridilaro pendis super ĝi. En la angulo, proksime al la fenestro, estis Kentucky-paŝilo apogita al la muro. Nevolite mi devis pensi pri Old Death, sed tiuj aĵoj sambone ja povus esti posedaĵo de iu alia.

Tiam mi malrapide promenis laŭ la strateto. Kiam mi volis iri ĉirkaŭ angulo, mi estis irante puŝata de viro, kiu venis de la alia flanko, kaj ne estis vidinta min.

„Good heavens!“ li kriis al mi. „Nu atentigu, *Sir*, antaŭ ke Vi kuras tiel ĉirkaŭ la angulo!“

„Se Vi supozas mian testudecan iradomaniero esti kurado, ostro certe ankaŭ estas *Mississippi steamer“*, mi respondis ridante.

Aŭdante la sonon de mia voĉo, la alia faris paŝon reen.

„Ĉu mi vidas ĝuste?“ li vokis. „Tiu ja estas la germana *greenfish*, kiu ne volas konfesi, ke li estas detektivo! Kio serĉendas al Vi tie ĉi en Texas, kaj eĉ en Matagorda, *Sir*?“

„Certe ne Vi, *Mr. Death!*“

„Tion mi kredas! Vi ŝajnas esti unu el tiuj homoj, kiuj neniam trovas, kion ili serĉas, sed kure kunpuŝiĝas kun ĉiuj homoj, pri kiuj ne indas okupiĝi. Certe Vi malsatas kaj soifas. Venu, ni ĵetu la ankron ie, kie oni povas trinki bonan germanan bieron! Via germana lagerbier ŝajnas hejmiĝi ĉie. Ĝi estas trovebla eĉ en tiu ĉi urbeteto, kaj mi taksas, ke tiu estas la plej bona biero, kiu haveblas de Vi. Ĉu Vi jam havas loĝejon?“

„Jes, tie transe en la ‚Uncle Sam‘.“

„Tre bone! Tie mi ankaŭ starigis mian *wigwam*.on.“

„Ĉu do en la ĉambro, en kiu mi rimarkis jungilaron kaj la pafilon, en la dua etaĝo?“

„Prave“, li rikanis. „Vi sciuj, ke mi neniam rezignas pri tiuj aĵoj. Ili pli kaj pli estis kariĝintaj al mi. Ĉevalo estas havebla ĉie, sed bona selo ne. Sed venu, *Sir!* Ĵus mi estis en ejaĉo, kie haveblis malvarmeta biero, je tiu junia tago vera komfortaĵo. Mi ŝate pretas, drinki unu aŭ kelkajn plurajn pli.“

La maljunulo kondukis min en malgrandan drinkejon, kie oni eldonis enbotelan bieron je alta prezo. Ni estis la solaj gastoj. Mi ofertis al li cigaron. Sed li ne akceptis ĝin. Anstataŭ li elpoŝigis pakon de maĉtabakon, kaj detranĉis de ĝi pecon, kiu estus sufiĉinta por kvin spertaj ŝipistoj. Tiun li ŝovis en la buŝon, restigis lin zorge malantaŭ unu vango, kaj ridetis amuzite.

„Nu, nun mi estas tute je Via servo. Mi arde volas aŭdi, kia vento irigis Vin tiel rapide sekve de mi. Ĉu estis vento bonŝanca?“

„Male, tre malbonŝanca.“

„Do Vi ne estis volinta iri tien ĉi?“

„Ne, sed al Quintana. Sed ĉar ne estas rapida vojaĝebleco tien, mi venis tien ĉi, ĉar oni diris al mi, ke mi facile estus trovinta ŝipon tie ĉi, kiu celas al la nomita ejo. Bedaŭrinde mi nun atendu du plenajn tagojn.“

„Eltenu tion kun pacienco, *Sir*, kaj konsoliĝu per la ekkono, ke Vi nu estas malfeliĉulo.“

„Bonaĉa konsolo! Ĉu Vi supozas ĝin inde, ke mi sendu al Vi dankleteron?“

„Bonvolu, jes!“ Old Death ridis. „Mi fordonas mian konsilon ĉiam senkoste. Cetere mi estas en la sama situacio kiel Vi. M’ankaŭ sidas tie ĉi senutile, ĉar mi estis estinta tro malrapide. M’volis iri al Austin, kaj tiam plu, iomete pli for trans la Rio Grande del Norte. La sezono estas bona ŝanco. Ĝi pluvadis, kaj tial la Colorado havas sufiĉe da akvo, pro porti malaltajn vaporboatojn al Austin. La rivero ĝenerale estas tre malriĉa je akvo la plej grandan parton de la jaro.“

„Mi aŭdis, ke baraĵo malebligas la ŝipiradon.“

„Ne vere estas baraĵo, sed fakte baraĵego, alnaĝiĝejo de ega amaso el morta ligno, kiu devigas la riveron ĉirkaŭ ok mejlojn kontraŭflue de tie ĉi, disigi en plurajn brakojn. Malantaŭ tiu alnaĝiĝejo sed estas ĉiam senbarita akvo ĝis Austin kaj ankaŭ pli for. Ĉar la irado estas barata de la alnaĝiĝejo, oni agas saĝe, kiam oni iras tien surlande, kaj surŝipiĝas nur tie. Tion mi ja intencis, sed Via germana *lagerbier* ekplaĉis al mi. Mi drinkis kaj drinkis, restis en Matagorda tro longe, kaj kiam mi atingis la alnaĝiĝejon, la vaporboato ĵus estis farinta sian adiaŭan fajfon. Do mi devis porti mian selon reen, kaj nun povas atendi, ĝis la neksta boato ekiros morgaŭ frue.“

„Do ni estas samsuferantoj, kaj Vi povas trankviliĝi per la sama konsolo, kiun Vi ĵus donis al mi. Vi nu ankaŭ estas malfeliĉulo.“

„Mi estas ne. Mi ne persekutas iun, kaj estas egala al mi, ĉu mi alvenas en Austin hodiaŭ aŭ semajnon poste. Sed tamen ĉagrenas, aparte ĉar tiu stulta *greenfrog* mokis pri mi. Li estis estinta pli rapide ol mi, kaj ridis pri mi de la ferdeko, kiam mi kaj mia selo devis resti tie sur la bordo. Se mi ajn iam retrovos tiun ulon ie, li ricevos tute alian vangofrapon kiel tiu, kiun li devis ricevi dum la irado super la vaporŝipo.“

„Vi interbatalis, ĉu *Sir*?“

„Ĉu interbatalis? Al kio Vi celas per tio? Old Death neniam interbataliĝas. Sed sur la ‚Delfeno‘, per kiu mi venis tien ĉi, estis ulo, kiu mokis pri mia persono, kaj ekridis, ajn kiam li ekvidis min. Mi do demandis lin, kio bonhumurigis lin tiel, kaj kiam li respondis, ke mia ostaro tiel gajigis lin, li ricevis *slap in the face*:on, ke li eksidiĝu. Nun li volis ataki min per la revolvero, sed la *captain* alvenis, kaj ordonis al li, ke li trankviliĝu. Ĝi estis okazinta rajtigite, ĉar li estis ofendinta min. Tial la fiulo ridadis pri mi, kiam mi atingis la alnaĝiĝejon tro tarde. Nur bedaŭrindas la kunulo, kun kiu li vojaĝis! Ŝajnis esti *gentleman*, sed ĉiam triste kaj funebre: ĉiam fiksigardis la teron antaŭ si kiel mense iritigite.“

Tiuj vortoj tuj vekis mian atenton, ĉar mi ja sciis, ke ankaŭ miaj du persekutantoj estis estintaj sur la ‚Delfeno‘.

„Ĉu ulo mense iritigite?“ mi demandis. „Ĉu Vi eble aŭdis lian nomon?“

„La *captain* nomis lin *Mr. Ohlert*.“

„Ha! Kaj lia kunulo?“

„Nomiĝis Clinton, se mi memoras ĝuste. — Sed *Sir*, kian mienon Vi faras? Ĉu Vi do interesas pri tiuj du viroj?“

„Ege, tre ege! Ja estas ili, kiujn mi volas trovi!“

Denove tiu amikeca rikano, kiun mi jam ofte estis vidinta de li, aperis sur lia vizaĝo.

„Bone!“ li kapjesis. „Do Vi finfine konfesas, ke Vi serĉas du virojn, ĉu? Kaj ĉu ĵus tiuj du? Hm! Vi vere estas *greenhorn*, *Sir*! Vi mem kaŭzis, ke Vi ne faris tiun kapton!“

„Kial?“

„Ĉar Vi ne estis sincere al mi en New Orleans.“

„Mi ja ne rajtis.“

„La homo rajtas ĉion, kio kondukas lin al bona celo, se nur ĝi ne kontraŭas al honesto kaj la leĝo. Se Vi estus klariginta Viajn intencojn al mi, ili estus nun sub Via forto. Mi estus rekoninta ilin, tuj kiam ili estis venintaj sur la ŝipon, kaj mi tuj estus fiksteninta, aŭ lasinta fiksteni ilin. Ĉu Vi ne komprenas tion?“

„Kiu nu povis scii, ke Vi trovus ilin tie! Cetere ili ne volis iri al Matagorda, sed al Quintana.“

„Tion ili nur diris, ili tute ne surlandiĝis tie. Se Vi volas est sagace, raportu Vian aferon al mi detale! Eble mi povos helpi al Vi, tiel ke Vi tamen finfine ektrovos la serĉintojn.“

Tiu viro sincere bonanimas pri mi. Ne ekideis al li riproĉi min, sed tamen mi sentis hontigite. Antaŭ malmultaj tagoj mi estis rifuzonta al li la informon, kaj nun mi estis

devigita de la cirkonstancoj sciigi lin. Mia mema sento flustris al mi, ke mi diru nenion al li, sed tamen la prudento fine venkis. Mi elpoŝigis la du lumbildojn, kaj montris ilin al li.

„Antaŭ mi sciigos Vin, rigardu tiujn vizaĝojn! Ĉu tiuj estas la personoj, pri kiuj Vi parolis?“

„Jes, ili estas. Ne eblas eraro.“

Nun mi sincere klarigis la situacion al li. Old Death aŭskultis min atente, kaj skuis la kapon pripense, kiam mi estis finiĝinta.

„Kion mi aŭdis de Vi, ĉio eblas kaj klaras. Nur unu aĵon mi ne komprenas. Ĉu tiu William Ohlert nu verece frenezas?“

„Ŝajne ne! Mi ja ne havas multajn spertojn en la fako de mensaj malsanoj, sed volas konstati, ke tio nur estas obsedo, ĉar Ohlert, krom tiu unu punkto, estas plenplene reganto de siaj mensaj kapabloj.“

„Des pli ne kompreneblas al mi, ke li toleras tian nelimitan influon de Gibson al si. Li ŝajnas obei al tiu homo en ĉia maniero. Ĉiukaze Gibson ruze transprenas la pensarojn de la malsanuloj, kaj uzas ilin pro liaj celoj. Nu, esperendas, ke ni klarigos ĉiujn liajn intrigojn.“

„Vi do estas konvinkita, ke ili estas sur la vojo al Austin, ĉu? Aŭ ĉu ili montris la intencon subordiĝi ie alie sur la vojo?“

„Ne. Ohlert diris al la *captain* de la ‚Delfeno‘, ke li volis iri al Austin.“

„Sed tio mirus min. Li ja certe ne dirus, kien li intencas vojaĝi.“

„Kial ne? Eble Ohlert tute ne scias, ke li estas persekutata, kaj ke li migras sencele. Li boneble kredas, ke li agas ĝuste, li vivas nur pro sia fiksa ideo, kaj ĉio alia estas la afero de Gibson. La frenezulo do ne supozis ĝin esti malutile deklari Austin:on kiel la celo de sia vojaĝo. La *captain* diris tion al mi. Kion Vi intencas fari?“

„Mi sekvu ilin, laŭeble rapide.“

„Sed ĝis morgaŭ frue Vi atendu, malgraŭ ĉiu nepacienco. Pli frue neniu ŝipo debordiĝos.“

„Kaj kiam ni alvenos tie?“

„En la nunaj cirkonstancoj de la rivero, postmorgaŭ.“

„Daminde longa tempo!“

„Vi memoru, ke tiuj du, malgraŭ la nunaj utilaj akvalteco, ankaŭ ne antaŭiĝas pli rapide. Tute ne eviteblas, ke la ŝipo iam aŭ tiam grundas, kaj tiam ĝi ĉiam daŭras iom da tempo, ĝis ĝi reeblas pluiri.“

„Se mi nur povus scii, al kio Gibson fakte celas, kaj kien li volas irigi Ohlert:on?“

„Jes, tio vere estas enigmo. Aĵn ian intencon li memkompreneble havas. La monsumoj, kiuj estas akiritaj ĝis nun sufiĉus igi lin riĉan viron. Li simple povus ekpreni ĉion, kaj lasi Ohlert:on kie li estas. Ke li ne faras tion, estas certa signo, ke li volas eluzi lin plu. Mi volas ekscii la kaŭzojn de tiu afero, kaj ĉar ni havas, almenaŭ intertempe, la saman vojon, mi disponigas min al Vi. Se Vi bezonas min, Vi povas havi min.“

„Via oferto estas akceptata per granda danko, *Sir*. Mi havas sinceran konfidon pri Vi, kaj jam Via nomo certigas, ke Via helpo estos utila al mi.“

Ni skuis la manon de la alia kaj plenigis niajn glasojn. Se mi nur estus konfidiginta al tiu viro jam en New Orleans!

Niaj glasoj ĵus estis replenigataj, kiam ekstere eksonis laŭta bruo. Kriaĉaj homaj voĉoj, kaj hurla hundblekado proksimiĝis. La pordo estis vehemente malfermŝirata, kaj ses viroj envenis, kiuj ŝajne jam estis drinkinta ne malgrandan amason. Neniu el ili malebriis. Krudaj figuroj kaj vizaĝoj, sude malpezaj vestaĵoj, kaj pompaj armiloj tuj frapas la okulojn je tiuj *rowdy*-oj. Ĉiu el ili estis ekipita per fusilo, tranĉilo, revolvero aŭ pistolo, krome ĉiuj havis pezan negrovipon pendanta sur la flanko, kaj ĉiu kunhavis hundon je dika rimeno. Ĉiuj tiuj grandaj hundoj estis de tiu zorge bredita raso, kion oni uzis en la sudaj ŝtatoj pro rekapti fuĝintajn negrojn, kaj estis nomataj sangohundoj aŭ homkaptuloj.

La fiviroj fiksrigardis nin per malhontaj vidoj, faliĝis sur la seĝojn, ke ili krakis, metis la piedojn sur la tablon, kaj frapadis sur ĝin per la kalkanumoj, per kio ili direktigis la ĝentilan demandon al la mastro, afable veni al ili.

„Ĉu vi havas bieron?“ unu kriis al li. „Ĉu germanan bieron?“

La timigita viro jesis.

„Tion ni volas drinki“, la *rowdy* kontinuis. „Sed diru antaŭe, ĉu vi estas mem ankaŭ germano!“

„Ne.“

„Estas via feliĉo. Ni volas drinki la bieron de la germanoj; sed ili mem estu rostataj en la infero, tiuj abolicionistoj, kiuj helpis al la Nordo, kaj kulpas, ke ni perdis nian laboron!“

La mastro rapide malaperis, pro regali siajn noblajn gastojn laŭeble baldaŭ. Senintence mi estis turniĝinta, pro vidi al la parolinto. Li rimarkis tion. Mi estas konvinkita, ke nenio malamikeca estis en mia vido; sed boneble li havis egan emon provoki iun, ĉar li kriis al mi:

„Kial vi rigardaĉas min? Ĉu mi ne parolis prave?“

Mi returniĝis kaj respondis nenion.

„Gardiĝu!“ Old Death flustris al mi. „Estas *rowdy*-oj el la plej malbona speco. Ĉiu-kaze maldungitaj sklavgardistoj, kiuj estis senlaborigitaj per la forigo de la sklaveco. Nun ili kuniĝis pro fari ĉiaspecajn maldecaĵojn. Pli bonas, ke ni ne atentu ilin. Ni rapide findrinku kaj foriru.“

Sed ĵus tiu flustrado tute ne plaĉis al la viro, kiun la aliaj nomis Blyth. Ree li kriis transe al ni:

„Kio indas al vi kaŝparoli, maljuna ostaro? Kiam vi parolas pri ni, faru tion laŭte, aŭ ni malfermos vian buŝon!“

Old Death silentis, metis sian glason al lia buŝo kaj trinkis. La homoj ricevis bieron kaj provgustis. La trinkaĵo vere bonis. Sed la gastoj estis en vera *rowdy*-a humuro, kaj ŝutis ĝin sur la teron. Tiu, kiu antaŭe estis kriinta, ankoraŭ tenis sian plenan glason en la mano.

„Ne sur la teron! Tie transe sidas du uloj, kiuj ŝajnas ŝati tiun aĵaĉon!“ li mokis. „Ili havu ĝin!“

Li resvingis, kaj ĵetis sian bieron trans la tablo sur nin. Old Death gardiĝe irigis sian brakumon trans sia malseka vizaĝo. Sed mi ne kapablis toleri la impertinentajn ofendaĵojn tiel trankvile kiel li. Mia ĉapelo, mia kolumo, mia vesto, ĉio de mi gutis, ĉar la ĉefa ŝprucaĵo estis trafinta min. Ĉagrenite mi returniĝis.

„Sir, mi petas Vin, ne fari tion duan fojon! Faru Viajn petolaĵojn kun Viaj kunuloj; kaj ni ne kontraŭos. Sed lasu nin bonvole trankvile!“

„Ĉu?“ Blyth kontraŭis. „Kion Vi do farus, se mi sentus emon surverŝi Vin refoje?“

„Tio videblos.“

„Videblos, ĉu? Nu, do ni tuj volas vidi, kio videblos. Mastro, novajn glasojn!“

La aliaj ridis kaj kriacas aplaŭdon al ilia estro. Estis klarvideble, ke li intencis ripeti sian impertinentaĵon.

„Pro la volo de Dio, *Sir*, ne ribelu kontraŭ tiuj fiuloj!“ Old Death avertis.

„Ĉu Vi timas?“ mi demandis.

„Ne ekideos al mi. Sed ili rapide havas la armilojn en la manoj, kaj kontraŭ insida kuglo eĉ la plej kuraĝa ulo ne povas fari ion. Ankaŭ memoru, ke ili havas hundojn!“

La fiuloj estis ligintaj iliajn hundojn al la tablogambojn. Pro ne esti retrafata de malantaŭ, mi residiĝis tiel, ke mi montris mian dekstran flankon al la *rowdy*:oj.

„Ha! Li sidiĝas en ĝustan pozicion!“ la parolanto vokis. „Li volas defendiĝi. Atentu! Tuj kiam li faros nur unu movon, mi eklasos Pluton:on al li. Ĝi estis trejnita ataki homojn.“

Li malligis la hundon, kaj tenis ĝin je la ŝnuro ĉe si. La mastro ne jam estis alportinta la bieron, ankoraŭ ni havis tempon, meti moneron sur la tablon kaj ekiri. Sed mi ne kredis, ke la grupaĉo estus lasinta nin foriri nemolestata, kaj krome mi ne ŝatis la penson ekfuĝi antaŭ tiuj fiaj homoj. Ĉar tiuj fanfarulaĉoj estas en la bazo de iliaj animoj nur malkuraĝuloj.

Mi metis la manon en la poŝon, kaj pafpretigis mian revolveron. Dum luktado mi havis bonajn ŝancojn, tion mi sciis. Mi nur dubis, ĉu mi estus sukcesonta venki la hundojn. Sed mi estis jam antaŭe atakita de bestoj, kiuj estis kolerigitaj pri fremdaj homoj, kaj almenaŭ ne devis timi atakon de unu sola el tiuj homkaptuloj.

Nun la mastro aperis. Li metis la glasojn sur la tablon, kaj turniĝis ĝentile petante al siaj batalemaj gastoj.

„*Gentleman*:oj, Via vizito tre agrablas al mi, sed mi petas Vin, lasi la du virojn tie trankvile. Ili ankaŭ estas miaj gastoj.“

„Bubaĉo!“ unu el ili kriis al li. „Ĉu vi volas instrui nin? Atendu, ni tuj malardigos vian fervoron!“

Kaj jam la enhavo de du aŭ tri glasoj estis verŝata sur la pacadmoninton, tiel ke li ekdecidis, ke li plej bone forlasu la gastejon.

„Kaj nun la grandbuŝulo tie!“ mia kontraŭulo vokis. „Li ĝin havu!“

Tenante la hundon per la maldekstra, Blyth ĵetegis la enhavon de sia glaso per la dekstra mano al mi. Mi ekstarigis kaj cedis flanken, tiel ke mi ne estis trafata. Tiam mi levis la pugnon, pro salti al la impertinentulon kaj punegi lin. Sed li ekagis pli rapide ol mi.

„*Pluto, go on!*“ li vokis, dum li lasis la hundon kaj montris al mi.

Mi ĵus havis sufiĉe da tempo paŝi al la muro, kiam la grandega besto faris tigrecan saltan al mi. La hundo estis estinta ĉirkaŭ kvin paŝojn for de mi. Tiun distancon ĝi transis per unu sola saltego. Dum tiu ĝi estis tiel precize en sia konduto, ke ĝi necese estus kapti mian kolon per la dentoj, se mi estus restinta starante. Sed ĵus, kiam ĝi volis ekkapti min, mi cedis flanken, kaj ĝi flugis al la muro, kaj puŝis ĝian buŝon sur ĝin. La salto estis estinta tiel forte, ke la sangohundo estis preskaŭ senkonsciigata per la ekfrapego. Ĝi falis teren. Fulmrapide mi kaptis ĝiajn malantaŭajn krurojn, svingis ĝin tra la aero, kaj ĵetegis ĝin per la kapo antaŭigita sur la muron, tiel ke la kranio disrompis.

Nun eksonis terura bruego. La hundoj hurlis, kaj tiris, retenataj de la rimenoj, la tablono de ĝia loko, la viroj malbenadis, kaj la posedanto de la morta hundo volis salti al mi. Sed tiam Old Death ekstarigis, kaj celigis siajn du revolverojn al la fiuloj.

„*Stop!* Nun ĝi sufiĉas, *boy*:oj. Nur unu paŝon plu, aŭ unu etendo al la armilo, kaj mi pafos. Vi eraris pri ni. Mi estas Old Death, la vojtrovisto. M’esperas, ke vi aŭdis pri mi. Kaj tiu viro, mia amiko havas same malpli timon antaŭ vi kiel mi. Sidiĝu kaj drinku vian bieron per modesteco, aŭ alikaze via bastono ekenaĝigos inverse laŭ la rivero!“

Ankaŭ mi estis ekpreninta mian revolveron. Ni kune havis dek ok pafojn. Antaŭ unu el tiuj *rondy*:oj povis ekhavi sian armilon, li ĉiukaze estus trafita de nia kuglo. La maljuna vojtrovisto ŝajnis ekestiĝi tute alia viro. Lia alikaze kurbigita figuro nun alte rektiĝis, liaj okuloj brilis, kaj en lia vizaĝo estis esprimo de supera volforteco, kiu nebligis kontraŭon. Ĝojige estis videble, kiel hontigitaj la antaŭe tiel impertinentaj uloj subite iĝis. Ili ja grumbletis kelkajn mallaŭtajn komentojn, sed tamen sidiĝis, kaj la posedanto de la morta hundo eĉ ne kuraĝis iri al la besto, ĉar tiukaze li estus proksimiĝinta al mi.

Ankoraŭ ni staris tie, la revolverojn minace en la manoj, kiam nova gasto envenis — indiano.

Li surhavis blanktanitan ĉasĉemizon. La *leggings* estis farita el la sama ŝtofo, kaj ornamita je la juntoj per ruĝaj dekoraciaĵoj. Neniu makulo, neniu eĉ ne eta malpuraĵo estis rimarkebla sur la ĉemizo kaj la pantalonono. Liaj malgrandaj piedoj estis en perlornamitaj *mokassin*:oj, kiuj estis dekoritaj per histrikaj pikiloj. Ĉirkaŭ lia kolo pendis la medicinsaketo, la lerte skulptita pacopipo kaj triobla ĉeno kun ungoj de la griza urso, kiujn li deprenis de la plej timita besto de la roka montaro. Ĉirkaŭ liaj koksoj li kiel zono havis altvaloran Saltillo-kovrotukon. El tiu eliĝis la teniloj de tranĉilo kaj du revolveroj. En la dekstra mano li tenis dutuban pafilon, en kies lignopartojn estis dense enbatitaj arĝentaj najloj. La kapo de la indiano estis nekovrita. Lia longaj, blunigraj haroj estis kunigitaj al kaskaforma plektaĵo, trateksita de sonserpenta haŭto. Neniu agloplumo, neniu distingilo ornamis la harojn, kaj tamen oni tuj ekkonis, ke tiu ankoraŭ juna viro tutcerte estis ĉefo, fama militisto. La trajtoj de lia serioza, virece bela vizaĝo povis esti nomata romece. La vangostoj elstaris apenaŭ rimarkeble; la lipoj de la senbarba vizaĝo estis plenaj, sed tamen delikate svingumitaj, kaj la haŭtkoloro estis malbrila helbruno, kun eta nuanco de bronzo. Dirite koncize: estis Winnetou, la ĉefo de la apaĉoj, mia sangofrato.

Li restis starante momenton je la pordo. Esploranta, arda vido de liaj malhelaj okuloj iĝis tra la ĉambrego kaj al la ĉeestantaj personoj. Tiam li sidiĝis en nia proksimo, laŭeble for de la *rowdy*:oj, kiuj vidis al li malbonhumure.

Mi jam estis levinta la piedon pro salte kuri al mia amiko kaj gaje saluti lin. Sed li ne atentis pri mi, kvankam li estis vidinta min, kaj malgraŭ mia nekutimaj vestaĵoj sendube estis rekoninta min. Li certe havis kaŭzon pro tio. Tial mi residiĝis kaj klopodis fari indiferentan mienon.

Oni rimarkis je Winnetou, ke li estis tuj kompreninta la situacion. Liaj okuloj iomete malestime kuniĝis, kiam li ĵetis duan, mallongan vidon al niaj kontraŭuloj, kaj kiam ni nun residiĝis kaj enzonigis la revolverojn, preskaŭ nerimarkebla bonvola rideto aperis sur liaj lipoj.

La efiko de lia personeco estis tiel granda, ke je lia eniro ekestis vera preĝejeca kvieto. La malbruo signis al la mastro, ke la danĝero pasiĝis. Li ŝovis la kapon tra la duonfermita pordo, kaj tiam gardiĝe posttiris la ceteran figuron, kiam li vidis, ke nenio estis timinda plu.

„Mi petas pri glaso da biero, germana biero!“ la indiano diris per bonsona voĉo en bona angla.

Tio estis stranga al la *rowdy*:oj. Ili kunigis la kapojn kaj komencis flustri. La vidoj, per kiuj ili rigardis Winnetou:n, ebligis diveni, ke ili ne parolis nenion avantaĝan pri li.

Li ricevis la bieron, tenis la glason kontraŭ la fenestra lumo, ekzamenis ĝin per bonvola spertula vido kaj drinkis.

„*Well!*“ li tiam diris al la mastro, kaj klakis per la lango. „Via biero bonas. La granda Manitou de la blanka viroj instruis al ili multajn artojn, kaj la bierfarado ne estas la plej malgrava inter tiuj.“

„Ne kredeblas, ke tiu viro estas indiano!“ mi flustris al Old Death, kvazaŭ Winnetou estus nekonata al mi.

„Li estas, kaj kia li estas!“ la maljunulo respondis al mi same mallaŭte, sed per emfazo.

„Ĉu Vi konas lin? Ĉu Vi renkontis lin jam antaŭe?“

„Ne jam renkontis. Sed mi rekonas lin per lia figuro, liaj vestaĵoj, liaj trajtoj, sed plej multe per lia pafilo. Estas la arĝenta pafilo, kies kuglo neniam maltrafas sian celon. Vi havas la feliĉon vidi antaŭ Vin la plej faman indianan ĉefon de Nordameriko, Winnetou:n, la ĉefon de la apaĉoj, kies nomo jam famiĝis malgraŭ lia juneco en la tuta longeco kaj larĝeco de la Unuiĝintaj Ŝtatoj!“

„Sed kiel li akiris tian anglan, kaj la kondutmanieron de blanka *gentleman*?“ mi ŝajniĝis nesciante.

„Li vojaĝas ofte en la orienton, kaj oni rakontas, ke eŭropa scienculo estis igita sub la forto de la apaĉoj, sed estis traktita de ili tiel bone, ke li decidis resti ĉe ili kaj instrui la indianojn esti pacema. Li estis la instruisto de Winnetou, sed certe ne tute sukcesis liajn filantropajn intencojn, kaj estis forgesita iom post iom.“

Tio estis parolita tre mallaŭte; preskaŭ mi estis povinta aŭdi ĝin. Sed tamen la indiano, kiu estis pli ol kvar metrojn for de ni, turniĝis, kaj parolis al mia nova amiko.

„Old Death eraras. La blanka scienculo venis libervole al la apaĉoj kaj estis elkore akceptita de ili. Li estiĝis la instruisto de Winnetou, kaj instruis al li esti bona kaj diferencigi la justecon de la maljusteco, la verecon de la malvereco. Li ne estis forgesita, sed li estis ege estimata en la pueblo apud la Rio Pecos, kaj neniam sopiris reen al la blankaj viroj. Kiam li estis mortigita per murdisto, oni starigis por li tombŝtonon kaj ĉirkaŭigis ĝin per vivkverkojn. Li transiris al la ĉiame verdaj savanlandoj. Tie Winnetou revidos Klekih-petra:n.“

Old Death ĝojis, ke li estis rekonita de tiu viro. Lia vizaĝo brilis per ĝojo.

„Ĉu, *Sir*, Vi konas min?“ li demandis haste.

„Winnetou ne jam estis vidinta Vin, sed rekonis Vin tuj, kiam li eniris“, la apaĉo klarigis. „Vi estas *scout*, kies nomo soniĝas ĝis Las Animas.“

Post tiuj vortoj li deturniĝis. Dum lia parolado neniuj trajtoj de lia vizaĝo estis moviĝintaj — nun li sidadis tie silente kaj ŝajne pripensante. Nur liaj orelkonkoj tremetis, kvazaŭ ili okupiĝis pri ia ekstera okazaĵo.

Dum tio la *rowdy*-oj interflustradis ĉiam plu, vidis demande unu al la alia, kaj fine ŝajnis esti dicensinta ion. Verŝajne ili ne konis Winnetou:n. Nun ili certe volis egaligi la malvenkon, kiun ili estis suferintaj kontraŭ ni, per tio, ke ili lasis senti lin, kiel ege ili malestimis ruĝhaŭtan homon. Dum tio ili certe opiniis, ke ne ekideus al mi aŭ Old Death ekbatali pro li; ĉar kiam ĝi ne estis ni, kiuj estis ofendataj, ni devis resti kviete laŭ la regantaj reguloj, kaj ni nur rigardu, kiel sendanĝera homo estis insultata. Do unu el ili stariĝis, Blyth, kiu antaŭe estis atakinta min, kaj paŝis malrapide kaj per provoka teniĝo al la *indsmán*. Mi elpoŝigis mian revolveron, pro meti ĝin tiel antaŭ min sur la tablon, ke mi povis ĉiutempe ekpreni ĝin facile.

„Ne necesas“, Old Death flustris al mi. „Militisto kiel Winnetou venkos eĉ la duoblan kvanton de tiaj buboj.“

La *rowdy* stariĝis vastkrure antaŭ la apaĉo, kaj metis siajn manojn sur la koksojn.

„Kio serĉendas al Vi tie ĉi en Matagorda, ruĝhaŭtulo? Ni ne toleras sovaĝulojn en nia urbo.“

Winnetou ne dediĉis unu vidon al la viro, metis sian glason al sia buŝo, trinkis gluton, kaj tiam remetis ĝin trankvile sur la tablon.

„Ĉu vi ne aŭdis, kion mi diris, damnenda ruĝhaŭtulo?“ la *rowdy* demandis. „Mi volas scii, kion vi faras tie ĉi. Vi ĉirkaŭkaŝiras kaj ludas spionon. La ruĝhaŭtulo estas je la flanko de la krimisto Juárez, kies felo ja ankaŭ ruĝas. Sed ni estas je la flanko de la imperiestro Maximilian, kaj pendigos ĉiun indianon, kiu riskas iri sur nia vojo. Se vi ne tuj kunvokas ‚Vivu la imperiestro Max‘, ni metos ŝnuron ĉirkaŭ vian kolon!“

Ankaŭ nun la apaĉo ne diris unu vorton. Neniuj trajtoj de lia vizaĝo moviĝis.

„Hundo, ĉu vi komprenas min? Mi volas respondon!“ la alia nun kriis al li, metante la pugnon sur lian ŝultron.

Jen la lerta korpo de la indiano ekfulmis alten.

„Reen!“ Winnetou vokis ordonante. „Mi ne toleras, ke kojoto hurlas al mi.“

Kojoto estas nomata la malkuraĝa preria vulpo, kiu ĝenerale estas supozata malestiminda besto. La indianoj uzas tiun esprimon, ajn kiam ili volas esprimi ilian plej

egan malestimon.

„Ĉu kojoto?“ la rowdy vokis. „Tio estas ofendo, pro kiu mi tuj fluigos vian sangon!“ Blyth elzonigis la revolveron. Sed tiam okazis io, kion li ne estis ekspektinta: la apaĉo batis la armilon el lia mano, ekkaptis lin je la koksoj, levis lin alten, kaj ĵetegis lin al la fenestro, kies vitro disrompis kaj flugis kune kun li eksteren sur la straton.

Tio estis okazinta multe pli rapide, ol oni povas rakonti ĝin. La tintado de la fenestro, la blekado de la hundoj, la kolera ekkrio de la kunuloj de la flugito, tio ĉio kaŭzis laŭtan bruegon, kiu sed estis subigita de la voĉo de Winnetou. Li paŝis al la fiuloj, kaj montris per la etendita mano al la fenestro.

„Ĉu iu el vi ankaŭ volas eliri tie? Li nur diru ĝin!“

Winnetou estis iĝinta tro proksime al unu el la hundoj. La besto volis ekmordi, sed ricevis piedbaton de la apaĉo, ke ĝi bojetante kaŝiĝis sub la tablo. La sklavgardistoj cedis malkuraĝe kaj silentis. Winnetou ne havis armilon en la mano. Lia personeco sole estis tio, kio enŝakigis ilin. Neniu respondis. La indiano similis al dresisto, kiu eniras en kaĝon, kaj elpelas la sovaĝecon el la tigroj nur per la vido de lia okulo.

La pordo estis malfermŝirata, kaj la elĵetito, kies vizaĝo estis lezita per la vitrerjoj, enpaŝis. Li estis elzonigita la tranĉilon kaj eksaltis al Winnetou per kolera krio. La apaĉo faris nur etan moviĝon flanken, kaj ekprenis rapide la manon, kiu tenis la tranĉilon. Tiam lia alia mano ekprenis la viron kiel antaŭe je la kokso, levis lin en la aeron, kaj faligis lin sur la teron, kie la rowdy restis kuŝante senkonscie. Neniu el la fiuloj moviĝis pro atakaĉi la venkinton. Winnetou trankvile etendis la manon al lia biero, kaj findrinkis ĝin. Tiam li mansignis al la mastro, kiu estis timplene retiriĝinta, prenis ledan saketon el la zono kaj metis malgrandan flavan aĵon en lian manon.

„Prenu tion pro la biero kaj la fenestro, *Mr. landlord*. Vi vidas, ke la ruĝa militisto pagas sian ŝuldon. Esperindas, ke Vi ricevos Vian monon ankaŭ de la blankaj *gentleman*-oj. Ili ne volas toleri ‚ruĝhaŭtulon‘ ĉe ili. Winnetou, la ĉefo de la apaĉoj foriras — sed ne, ĉar li timas antaŭ ili, sed ĉar li ekkonis, ke nur la haŭto, sed ne la animoj de tiuj palvizaĝoj havas helan koloron. Ne plaĉas al li resti ĉe ili.“

Li forlasis la ĉambregon, post li estis preninta sian arĝentpafilon, sen vidi plu al iu. Refoje ankaŭ ne al mi.

Nun revekis la vivo en la *rowdy*-oj. Sed signife ilia scivolo ŝajnis pli granda ol ilia kolero, ilia hontigo kaj ankaŭ ilia zorgo pri la nekonscia kunulo. Antaŭ ĉio ili demandis la mastron, kion li estis ricevinta.

„*Nugget*-on“ li respondis, montrante la almenaŭ avelgranda peco de pura oro. „*Nugget*-on, kiu valoras almenaŭ dek du dolarojn. Per tio la fenestro estas pli ol sufiĉe pagita. Ĝi estis malnova kaj putrinta, kaj havis plurajn fendetojn en la vitro. La *indsman* ŝajnis havi la tutan saketon plena je tiuj *nugget*-oj.“

La fiuloj esprimis ilian ĉagreniĝon pri tio, ke ruĝhaŭto posedis tian amason da oro. La oreron estis donata de mano al mano, kaj estis taksata je valoro. Ni uzis la ŝancon pagi niajn drinkokostojn kaj foriri.

„Nu, kion Vi diras pri tiu apaĉo, *Sir*?“ Old Death demandis min, kiam ni feliĉe estis irintaj ekstere. „Ĉu eblas ekzisti dua *indsman* kiel tiu? La fiuloj cedis antaŭ li kiel la

paseroj je la ekvido de falko. Domaĝe, ke li malaperis tiel rapide! Ni estus povinta iomete iri post li. Mi tre ŝate volus scii, kion li faras tie ĉi, ĉu li tranoktas ekster la urbo aŭ loĝas en gastejo. Li certe estis lasinta sian ĉevalon ie alie, ĉar sen ĉevalo neniu apaĉo estas penseble. Cetere, *Sir*, Vi ja ankaŭ faris Vian taskon tute ne malbone. Mi preskaŭ estus ektiminta, ĉar ĉiam danĝeras provoki tiajn ulojn. Sed la aŭdaca kaj lerta maniero, per kiu Vi traktis la beston, supozigas, ke Vi ne estos *greenhorn* longe plu. Sed jen ni estas en la proksimo de nia loĝejo. Ĉu ni eniru? Mi pensas, ke ne. Maljuna *trapper* kiel mi ne ŝate lasas sin premi inter du murojn; plej favore mi havas la liberan ĉielon super mi. Ni pli bone ĉirkaŭiru tra tiu bela Matagorda. Mi ne scias, kiel pasigi la tempon pli bone. Aŭ ĉu Vi eble emas fari ludeton?“

„Ne. Mi ne estas ludisto, kaj ankaŭ ne havas la intencon ekiĝi unu.“

„Prave, juna viro! Sed tie ĉi ludas preskaŭ ĉiu, kaj la afero eĉ pli aĉiĝas ĝis Meksikujo. Tie ludas viro kaj virino, kato kaj muso, kaj la tranĉiloj ne tre emas resti trankvile en la zono dum tio. — Ni amuziĝu per promenado! Poste ni manĝu, kaj kuŝiĝu frue pro dormi. En tiu benata lando oni ja scias neniam, ĉu aŭ kiam oni povas kuŝiĝi pro ripozo je la sekvanta vespero.“

„Ja ne estos tiel malbone!“

„Vi ne forgesu, ke ni troviĝas en Texas, kies cirkonstancoj tute ne jam estas ordigitaj. Ekzemple ni intencas iri al Austin. Sed estas pridubinda, ĉu ni alvenos tie. La okaziĝoj en Meksikujo ankaŭ transigis siajn ondojn trans la Rio Grande. Tie okaziĝas multon, kiu kutime ne okaziĝas, kaj krome ni enkalkulu la ekideojn de tiu Gibson. Se intertempe li ekŝanĝis sian opinion, interrompis la iradon al Austin, kaj surbordiĝis ie alie, ni estos devigata fari la samon.“

„Sed kiel ni ekscios, ĉu li estis deŝipiĝinta?“

„Per demandado. La vaporboato permesas tempon al sia irado sur la Colorado. Tie oni ne hastas tiel kiel sur la Mississippi aŭ aliloke. En ĉiu urbeto certe restos eta kvarona horeto al ni pro fari nian reserĉon. Ni eĉ teniĝu pretaj surbordiĝu ajn ie, kie tute ne estas urbo aŭ gastejo.“

„Kaj kio tiukaze okazos al mia kofro?“

Old Death ridis laŭte pri mia demando.

„Kofro, kofro!“ li vokis. „Kofro ja estas restaĵo de pratempa komplikeco. Kia prudenta homo penas kunporti tian bagaĵon! Ekipiĝu per tio, kio necesas en la momento; ĉion alian aĉetu je la tempo de neceso! Kiujn gravajn aĵojn Vi do havas en Via malnova kesto?“

„Vestojn, vestaĵojn, kombilon, broson, soapon, maskaĵojn, kaj tiel plu.“

„Tiuĵ ĉiuj estas dece belaj aĵoj, sed ili haveblas ĉie. Kaj kie ili ne estas haveblaj, ili ne necesas. Oni surhavas ĉemizon, ĝis oni ne plu bezonas ĝin, kaj tiam aĉetas novan. Ĉu purigilojn? Ne pensu malbone pri tio, *Sir*, sed haraj kaj ungaj brosoj, pomadoj, barbciro kaj tiaj aĵoj nur malglorigas la viron. Ĉu maskaĵoj? Tiuĵ boneble estis tre utilaj tie, kie Vi estis estinta ĝis nun, sed ili ne plu servos al Vi tie ĉi. Ĉi tie ne necesas al Vi kaŝiĝi sub falsaj haraĵoj. Tia romantika sensencaĵo ne kondukos Vin al Via celo. Ĉi tie endas tuj ekpreni, kiam Vi trovas Vian Gibson-on. Kaj —“

La maljunulo ekstaris, kaj rigardis min de supre ĝis sube, faris bonhumuron mienon, kaj tiam kontinuus:

„— tiel, kiel Vi nun staras antaŭ mi, Vi povas aperi en la ĉambro de plej postulema *lady*, aŭ sur la parterro de ajn iu teatro. Sed Texas havas tute ne ajn ian similon al dama ĉambro aŭ teatra loĝio. Facile eblas, ke jam post du aŭ tri tagoj Via fajna vesto estos nur ĉifonaĵo ĉirkaŭ Vi, kaj ke Via cilindra ĉapelo havos la formon de tirharmoniko. Ĉu Vi do scias, kien Gibson iros? Tute neblas, ke lia intenco estas resti en Texas. Li volas malaperi, kaj tial li pasu la limon de la Unuiĝintaj Ŝtatoj. Ke li iris en la direkton al tie ĉi pruvis, ke estas nepridubebla, ke li volas iri al Meksikujo. La krimisto povos malaperi en la malordo de tiu lando, kaj neniu homo, same neniu polico, helpos al Vi trovi lin tie.“

„Eble Vi pravas. Sed mi pensas, ke se li vere volas iri al Meksikujo, li estus irinta tien tuj rekte.“

„Sensencaĵo! Gibson devis forlasi New Orleans:on tiel haste, ke li devis uzi la nekstan ekirintan ŝipon. Krome la meksikaj havenoj estas okupataj de la francoj. Ĉu Vi nu scias, ĉu li volas negoci kun ili? Li ne povis elekti; li devis iri surlande, kaj ĉiukaze estas sufiĉe saĝa, lasi sin vidi ne tro ofte en la pli grandaj urboj. Tial eblas, ke li ankaŭ evitos Austin:on, kaj jam antaŭe estis surbordiĝinta ie aliloke. Li iros al la Rio Grande, ĉevalo memkompreneble, trans malmulte loĝinta lando. Ĉu Vi volas sekvi lin tien kun Via kofro, Via cilindra ĉapelo kaj en tiu fajna vestaĵo? Se tiu estas Via intenco, mi devus ridi pri Vi.“

Mi sciis tre bone, ke li pravis, sed faris la spritaĵon plende rigardi suben al miaj vestaĵoj. Li ridante frapis mian ŝultron.

„Ne ĉagreniĝu troe. Nur gaje fordonu tiun senutilan veston! Iru tie ĉi al komercisto, pro vendi ĉiujn Viajn aĵaraĉon, kaj akiru anstataŭe aliajn vestaĵojn! Vi senkondiĉe havu firman, daŭreman *trapper*:an veston. M'taksas, ke oni ekipis Vin per sufiĉe da mono?“

Mi kapjesis.

„Nu, tiel ja ĉio bonas“, li diris. „Do nur forigu tiujn afektaĵojn! Vi ja povas rajdi kaj pafi, ĉu ne?“

Mi jesis.

„Vi ankaŭ havu ĉevalon“ la maljunulo kontinuus, „sed oni ne aĉetas ĉevalon tie ĉi sur la marbordo. Ĉi tie la ĉevaloj estas multekostaj kaj malbonaj. Pli fore sur la lando ĉiu farmisto donos ĉevalon al Vi, sed ne selon kune. Tiun Vi aĉetu tie ĉi.“

„Ho ve! Ĉu mi do ĉirkaŭiru kiel Vi, kun la selo sur la dorso?“

„Certe. Kial ne? Ĉu Vi do hontas antaŭ la homoj? Kies afero ĝi estu, ĉu mi portas selon? Nenies! Se ĝi plezuras al mi, mi kunportas sofon, proke mi povas ripozadi iomete sur ĝi en la prerio aŭ en la sovaĝa arbaro. Ajn kiu ridas pri tio, al tiu mi donos frapon sur la nazon, tiel ke ĉiaj eblaj fiksastroj brilas antaŭ liaj okuloj. Oni hontu nur tiam, kiam oni faras maljustaĵon aŭ infanaĵon. En la kazo, ke Gibson estis ie surbordiĝinta kun William Ohlert, aĉetis ĉevalojn kaj forrajdis, vi vidos, kiel avantaĝa ĝi estas tuj havi selon ĉemane. Faru kion Vi volas! Sed se Vi vere deziras, ke mi restas ĉe Vi, agu laŭ mia konsilo. Do decidu rapide!“

Li diris tion, sed ne atendis mian decidon, plie ekprenis mian brakon, turnis min, kaj montris al domo kun granda vendejo, super kiu estis legebla per ulnegrandaj literoj: *General Store*, kaj tiris min al la enirejo. Tie li donis puŝon al mi, ke mi faletis enen kaj kontraŭ malferma haringobarelo, kaj tiam li enpromenis post mi.

La vendeja ŝildo diris la verecon. La vendejo estis tre granda, kaj enhavis vere ĉion, kio povis esti necesa en la tieaj cirkonstancoj, eĉ selojn kaj pafilojn.

Kio sekvis nun, vere estis nekomparebla. Mi egaligis al lerneja bubo, kiu staris kun sia patro antaŭ la kermesa stando, kaj rajtas nur hezite esprimi siajn dezirojn, sed fine devas preni, kion la sperta patro elektas por li. Mi ankaŭ toleris tiun kuratorecon, kaj dum tio intence ludis la *greenhorn*-on, kiun la maljunulo supozis min esti. Dum tio mi jam antaŭĝojis pri la momento, kiam li finfine devis ekkompreni sian eraradon.

Old Death kondiĉis ĵus je la komenco, ke la posedanto de la vendejo prenu mian stratan veston, kaj ankaŭ la tutan enhavon de mia kofro kiel pago. La viro ŝate akceptis tion, kaj tuj forsendis sian *storekeeper*-on pro alporti la kofron. Kiam miaj aĵoj estis tie, ili estis pritaksataj, kaj nun Old Death komencis elektadi por mi. Mi ricevis nigran ledpantalanon, paron da altaj botoj kun spronoj, ruĝkotonan ĉemizon, kamizolon en la sama koloro kaj tre multaj poŝoj, nigrakotonan koltukon, cervledan ĉasĉemizon, nekolorigitan, ledan zonon, du manojn vaste kaj interne malplene, kuglan kaj tabakan saketon, tabakpilon, kompason kaj dudek aliajn necesajn malgrandaĵojn, piedkovrilon anstataŭ la strumpoj, grandegan sombronon, kotonan kovrotukon kun fendo en la mezo pro trameti la kapon, lazon, pulvokornon, fajrilon, *bowie*-tranĉilon, selon kun poŝoj kaj jungilaro, kaj ankaŭ duan revolveron. Tiam elektendis pafilo. Old Death ne estis amiko de novaĵoj. Li flanken forŝovis ĉion, kio estis juna, kaj ekprenis malnovan *rifle*-on, pri kiu certe neniu alia estus atentiginta. Postke li estis ekzameninta ĝin per spertula mieno, li ŝarĝis ĝin, iris eksternen antaŭ la vendejon kaj pafis al la frontona ornamaĵo de fora domo. La kuglo trafis.

„*Well!*“ li kapskuis kontente. „Tiu ĉi taŭgas. Tiu pafilo troviĝis en bonaj manoj, kaj valoras multe pli ol ĉiu aĵaĉaro, kiun oni honorigas hodiaŭ per la nomo pafilo. M’taksas, ke tiu pafilo estis farita de deca majstro, kaj volas esperi, ke Vi faros la decan honoron al li. Nur kuglan muldilon plu, kaj ni pretas. Plumbon ni ankaŭ povas aĉeti tie ĉi. Tiam ni iros hejmen kaj fandos kugloprovizon, pri kiu oni ektimiĝu tie transe en Meksikujo.“

Post ke mi elektis kelkajn kromajn etaĵojn, mantukojn kaj tiajn aĵojn plu, kiujn Old Death supozis tute nenecesaj, mi devis iri en etan flankĉambron pro surmeti la vestaĵojn. Kiam mi revenis en la vendejon, la maljunulo rigardis min bonvole.

Kaŝe mi estis havinta la esperon, ke li estus portanta la selon. Sed tio ne ekideis al li. Li metis la aĵojn sur mian dorson, kaj ŝovis min eksteren.

„Nu!“ li subridis ekstere. „Nun vidu, ĉu Vi hontu aŭ ne! Ĉiu komprenkapabla viro supozos Vin esti *gentleman*, kaj kion diros la nekomprenantaro, tio interesu la diablon, sed ne Vin.“

Nun mi ne plu estis en pli bona situacio ol Old Death, kaj devis pacience porti mian jugon al la gastejo, dum li fiere paŝis flanke de mi kaj ĉiukazie ĝojis vidi min esti mia propra bagaĵportanto.

En la „hotelo“ li tuj kuŝiĝis. Sed mi refoje eliris pro serĉi Winnetou:n. Estis kostinta antaŭe mian plenan memregon, ne ekĉirkaŭbraki lin. Nun mi ne ŝatis pasigi la revidon kun li simple tiel. Mi estis antaŭgŝojinta pri ĝi tiel ege. Kiel mia amiko estis veninta al Matagorda, kaj kion li volis tie ĉi? Kial li agis, kvazaŭ li ne konus min? Tio certe havis kaŭzon.

Tutcerte Winnetou havis la saman intencon paroli kun mi, kiel mi sopiris povi interparoli kun li. Verŝajne li ie atendis min. Ĉar mi konis liajn kutimojn, ne malfacilis al mi trovi lin. Li certe estis rigardinta nin, kaj vidis, ke ni iris en tiun hotelon, kaj do li certe troveblis en la proksimo. Mi iris al la malantaŭa flanko de la domo, kiu limis al libera kampo. Ĝuste! En la distanco de kelkaj cent paŝoj mi vidis lin apogi al arbo. Kiam li rimarkis min, li forlasis sian pozicion, kaj iris malrapide al la arbaro. Mi sekvis lin. Sub la arboj, kie li atendis min, li iris renkonte al mi per ĝojbrila vizaĝo.

„Ŝarlih, mia kara, kara frato! Kian plezuron cia neekspektita apero faris al la koro de Winnetou. Tiel ĝojas la mateno, kiam post la nokto aperas la suno!“

Li tiris min al si, kaj ĉirkaŭbrakis min.

„La mateno scias, ke la suno venu“, mi respondis, „sed ni ne povis antaŭscii, ke ni renkontiĝus tie ĉi. Kiel ĝi feliĉigas min reaŭdi cian voĉon!“

„Kio direktigis cian piedon en tiu ĉi urbon? Ĉu ci negocu tie ĉi, aŭ ĉu ci nur iras tra Matagorda pro iri de tie ĉi al la Rio Pecos?“

„Mi devas solvi taskon tie ĉi.“

„Ĉu mia blanka frato rajtas paroli al mi pri tiu tasko? Ĉu li rakontos al mi, kie li estis, ekde ni disiris?“

Winnetou tiris min iomete pli for en la arbaron, kie ni sidiĝis. Je lia flanko mi rakontis al li pri miaj travivaĵoj. Kiam mi estis je la fino, li kapjesadis serioze.

„Mia frato travivis multon ekde nia lasta disiro, Winnetou aliflanke nenion specialan. Li devis fari multajn kaj longajn rajdadojn, pro viziti la tribojn de la apaĉoj, kaj deteni ilin de nepripensitaj ekagoj, kaj ili volis iri al Meksikujo, pro partopreni tie en la bataladoj. Ĉu mia frato aŭdis pri Juárez, la ruĝa prezidanto?“

„Jes.“

„Kiu pravas, ĉu li aŭ Napoléon?“

„Juárez.“

„Mia frato pensas kiel mi. Mi petas cin ne demandi min, kion mi faras tie ĉi en Matagorda. Mi silentu pri tio eĉ al ci, ĉar mi promesis prisilentadon al Juárez. Ĉu ci sekvos, kvankam ci ektrovos min, la du palvizaĝojn, kiujn ci serĉas?“

„Mi devas, kaj mi tre ĝojus, se ci povus akompani min. Ĉu tio ne eblas al ci?“

„Ne. Mi plenumu devon, kiu estas same granda kiel cia. Mi restu ankoraŭ hodiaŭ; sed morgaŭ mi iros per la ŝipo al La Grange, de kie mi iros trans Fort Inge al la Rio Grande del Norte.“

„Ni iros per la sama ŝipo, sed mi ne scias, kiel longe. Do morgaŭ ni ankoraŭ estos kune.“

„Ne. Mi ne volas impliki mian fraton en mian aferon. Tial mi ankaŭ agis en la bierejo, kvazaŭ mi ne konus cin. Ankaŭ pro Old Death mi ne parolis al ci.“

„Kion ci volas diri per tio?“

„Ĉu li scias, ke ci estas Old Shatterhand?“

„Ne. Tiu nomo ne estis menciita inter ni ĝis nun.“

„Li certe konas ĝin. Ci nun estis forestinta longan tempon, kaj tial ci ne scias, kiel ofte estas parolata pri ci en la okcidento. Old Death certe aŭdis pri Old Shatterhand. Sed li ŝajne supozas cin esti *greenhorn*, ĉu?“

„Tio jes estas la kazo.“

„Do estos granda surprizo, kiam li aŭdos, kiu tiu *greenhorn* estas; tiun mi ne volas fuŝigi al mia frato. Do ni ne interparolos sur la ŝipo. Kiam ci estos trovinta Ohlert:on kaj lian forkaptinton, ni tiam estos kune des pli longe, ĉar ci ja certe venos al ni, ĉu?“

„Tutcerte!“

„Do ni nun disiru, Ŝarlih. Estas tie ĉi palvizaĝoj, kiuj atendas min.“

Winnetou ekstaris. Mi devis respekti lian sekreton, kaj adiaŭiĝis de li, esperende nur por mallongan tempon. —

Je la sekvinta mateno Old Death kaj mi luis du mulojn, sur kiuj ni rajdis al la alnaĝiĝejoj, kie la vaporboato atendis la vojaĝantojn. Sur la bestojn ni estis metintaj niajn selojn.

La *steamer* estis malprofunde enakviĝanta boato, kaj plene konstruita en amerika stilo. Jam multaj pasaĝeroj troviĝis sur ĝi. Kiam ni, nun certe la selojn sur la ŝultroj, paŝis trans la tabulo kaj venis sur la ŝipon, laŭta voĉo vokis:

„*By Jove!* Jen venas du dukruraj selitaj muloj! Ĉu oni jam estis vidinta tion? Devojiĝu, homoj! Enlasu ilin en la ĉambron! Tiaj brutoj ne restadu inter *gentleman*:oj!“

Ni konis tiujn voĉojn. La plej bonaj seĝoj de la tegmenthava unua rango estis okupataj de la *rowdy*:oj, kiujn ni estis renkontintaj hieraŭ. La laŭta krianto de hieraŭ, kiu ĝenerale ŝajnis esti ilia estro, estis bonvenigitaj nin per tiu refoja ofendo. Mi turniĝis al Old Death. Ĉar li toleris la vortojn trankvile, mi ankaŭ agis, kvazaŭ mi ne estus aŭdintaj ilin. Ni sidiĝis vidalvide al la uloj, kaj ŝovis la selojn sub niajn seĝojn.

La maljunulo komfortiĝis, elzonigis revolveron, pafpretigis ĝin kaj metis ĝin flanke de si. Mi ankaŭ sekvis lian ekzemplon je tio. La fiuloj kunigis la kapojn kaj interflustris, sed ne kuraĝis refoje aŭdigi laŭtan ofendaĵon. Iliaj hundoj, el kiu certe unu mankis, ili ankaŭ kunhavis hodiaŭ. La estro rigardis nin per speciale malamikecaj vidoj. Lia teniĝo estis fleksigita, kompreneble per la flugo tra la fenestro kaj la posta, ne vere softa traktado de Winnetou. Lia vizaĝo ankoraŭ havis la freŝajn spurojn de la disiĝinta fenestra vitro.

Kiam la *conductor* venis, pro demandi nin, kiel longe ni volis kunvojaĝi, Old Death nomis la urbon Columbus; ĝis tie ni pagis la koston. Tie ni ja povis pagi kroman vojaĝon. Mi havis la opinion, ke Gibson ne estis irinta tutvoje al Austin.

La sonorilo jam estis farinta la duan signalon, kiam venis kroma kunvojaĝanto — Winnetou. Li sidis sur sia Iltŝi, pompa, indiane jungilita nigra virĉevalo, deĉevaliĝis nur sur la ŝipo, kaj kondukis la ĉevalon al la prua ferdeko, kie estis starigita ŝultroalta tabula apartaĵo por la kuntransportataj ĉevaloj. Tiam li sidiĝis, ŝajne sen atentiĝi pri iu alia, trankvile flanke de ĝi sur la balustradon de la ŝipa apogrelo. La *rowdy*:oj kraĉis kaj laŭte tuis, pro direktigi lian vidon al ili, sed vane. Li sidis, apogita sur sia arĝentpafilo, deturnigite de ili, kaj ŝajne atentigis nek okulon nek oreton pri ili.

Nun ĝi sonorilis lastan fojon. Post kelkaj atendaĵoj, ĉu eble ankoraŭ venus pasaĝeroj, la radoj ektorniĝis, kaj la ŝipo komencis la vojaĝon.

Nia irado ŝajnis okaziĝi bone. Estis ĝenerala kvieto sur la ŝipo ĝis Wharton, kie unu sola viro surbordiĝis, sed anstataŭe multaj pasaĝeroj surŝipiĝis. Old Death iris sur la bordon kelkajn minutojn, pro demando la *commissioner*-on pri Gibson. Li eksciis, ke du viroj, al kiuj similis lia priskribo, ne estis surbordiĝintaj tie ĉi. Tiun rezulton liajn demandojn havis ankaŭ en Columbus, kial ni tie krompagis ĝis La Grange. De Mata-gorda ĝis Columbus la ŝipo devis transi la distancon de ĉirkaŭ kvindek iradaj horoj. Ĝi do ne plu estis frue je la posttagmezo, kiam ni alvenis tie. Dum tiu longa tempo Winnetou estis forlasinta sian sidejon nur unu fojon, pro alporti akvon al sia ĉevalo, kaj doni maizerojn al ĝi.

La *rowdy*-oj ŝajne estis forgesintaj ilian koleron pri ni kaj li. Ili okupiĝis pri la novaj pasaĝeroj, sed ĉiam estis traktataj rezerviĝe. Ili fanfaronis pri ilia politika opinio, demandis ĉiun pri lia, kaj insultis ĉiujn, kiuj ne havis la saman. Esprimoj kiel ‚damn-enda respublikano‘, ‚finegra onklo‘, ‚*yankee*-servisto‘ kaj aliaj eĉ pli malbelaj nur fluis el iliaj buŝoj, kio konsekvencis, ke oni teniĝis de ili, kaj ne volis paroli kun ili. Tio ĉiukaze ankaŭ estis la kaŭzo, ke ili rezignis pri ekparoli al ni. Ili ne povis trovi helpon. Sed se estus estinta pli da secesionistoj sur la ŝipo, la paco tie certe estus serioze endanĝerigita.

En Columbus nun multaj el la pacemaj homoj forlasis la *steamer*-on, kaj anstataŭ surŝipiĝis homoj de tute alia speco. Tie ŝanceliĝis grupaĉo el eble dek kvin ĝis dudek ebruloj trans la tabulo, kiuj antaŭsciigis nenion bonan, kaj estis bonvenigataj de la *rowdy*-oj per arda ĝojo. Pluraj el la novaj pasaĝeroj enariĝis ĉe ili, kaj baldaŭ oni povis vidi, ke la kanajlaro nun estis la multenombro. La uloj maldece sidiĝis sur la seĝojn, sen demando, ĉu ili nekonvenis al la aliaj aŭ ne, interpuŝiĝis jen kaj reen inter la trankvilaj pasaĝeroj, kaj faris ĉion pro montri, ke ili supozis ilin esti la mastroj de la ŝipo. La kapitano lasis ilin bruegi. Li certe opiniis, ke estus la plej bona ne atenti pri ili. Tiel longe, kiel ili ne malhelpis al la ŝipiradon, li translasis ĝin al la vojaĝantoj saviĝi antaŭ atakoj mem. En lia vizaĝo estis tute neniu *yankee*-a trajto. Lia figuro estis plena, kiel ĝi estas videbla nur malofte je amerikano, kaj sur lia ruĝvanga vizaĝo ĉiam estis ĉiama bonvola rideto, kiu indikis, laŭ mia pritakso, al vere germana origino.

La plej multaj secesionistoj estis irintaj en la refreŝiĝan ĉambron. De tie bruegis sovaĝa kriaĉado. Boteloj estis disbatataj. Tiam negro elkuris kriante, certe la kelnero, grimpis supren al la kapitano, kaj plorvoĉe deklamis siajn preskaŭ nekompreneblajn plendojn al li. Mi nur komprenis tiom, ke li estis batita per vipo, kaj pli poste estu pendigota je unu el la kamentuboj.

Nun la kapitano faris jam pli pripenseman mienon. Li elvidis, ĉu la ŝipo iris en la ĝustan direkton, kaj tiam subeniris, pro iri en la refreŝiĝan ĉambron. La *conductor* venis renkonte al li. Ili renkontis en nia proksimo. Ni aŭdis, kion ili interparolis.

„*Capt'n*“, la *conductor* anoncis, „ni ne plu spektu senage. La homoj planas malicaĵojn. Irigu la indianon tie sur la landon! Ili volas pendigi lin. Li hieraŭ mistraktis unu el ili. Krome du blankuloj estas tie ĉi, mi nur ne scias, kiuj, kiuj estu linĉataj, ĉar ili ĉeestis hieraŭ. Ili laŭdire estas spionoj de Juárez.“

„*By Jove!* Tio serioziĝas. Kiuj du homoj povus esti tiuj?“

„Estas ni, *Sir*“, mi simple anonciĝis, perke mi stariĝis kaj paŝis al ili. „Mia kunulo tie, kaj mi.“

„Ĉu Vi? Nu, se Vi estas spiono, mi manĝos mian *steamboat*:on kiel matenmanĝo!“ li diris, ekzaminante min.

„Ja ankaŭ ne ekideos al mi. Mi estas germano, kaj tute ne zorgiĝas pri via politiko.“

„Ĉu germano? Do ni ja estas samlandanoj! Mi nomiĝas Hofer, kaj vidis mian unuan fluantan akvon en la Neckar. Nenio okazu al Vi. Mi tuj albordiĝos, proke Vi povos iĝi en savecon.“

„Mi ne partoprenos en tiu ludo. Mi nepre pluiru sur tiu ĉi boato, kaj ne povas perdi tempon.“

„Ĉu? Tio agrablas. Atendu momenton!“

Li iris al Winnetou kaj diris ion al li. La apaĉo aŭskultis lin senvorte, malestime skuis la kapon, kaj deturniĝis. La kapitano revenis al ni kaj anoncis kun ĉagrenita mieno:

„Mi antaŭsciis tion. La ruĝuloj havas fere durajn kapojn. Li ankaŭ ne volas esti surbordigata.“

„Tiukaze li, kune kun tiuj du sinjoroj pereos, ĉar la fiuloj certe realigos iliajn intencojn“, la *conductor* komentis zorgante. „Kaj ni malmultaj viroj de la *steamer* ne kapablos venki tian superforton.“

La kapitano rigardis suben pripensante. Finfine ekstremetis gajeco tra lia bonvolema vizaĝo, kvazaŭ li estus ekhavinta bonegan ideon. Li returniĝis al mi kaj Old Death, kiu intertempe ankaŭ estis proksimiĝinta.

„Mi faros petolaĵon al tiuj secesionistoj, pri kiu ili pensu ankoraŭ longan tempon. Sed Vi konduku ekzakte tiel, kiel mi postulos ĝin de Vi. Antaŭ ĉio ne uzu Viajn armilojn! Metu Viajn pafilojn tien sub la seĝojn al la seloj! Defendiĝo nur estus malbonigonta la aferon.“

„*The devil!* Ĉu ni trankvile permesu ke oni linĉas nin, *Sir*?“ Old Death grumblis ĉagrenite.

„Ne. Reteniĝu! Mia rimedo efikiĝos en la ĝusta momento. Ni malardigu tiujn fibubojn per banado. Fidu pri mi! M'nun ne havas tempon longe klarigi. La uloj jam alvenas.“

Fakte la bando nun venis el la refreŝiĝejo. La kapitano rapide retiriĝis de ni, kaj donis kelkajn mallaŭtajn ordonojn al la *conductor*. Tiu hastis al la direktilisto, ĉe kiu staris du al la boato anantaj *deckband*:oj. Mallongan tempon poste mi vidis lin esti okupata flustri kaŝitajn indikojn al la pacemaj pasaĝeroj, sed ne plu povis atenti pri li, ĉar mi kaj Old Death estis ekokupataj de la secesionistoj. Mi nur rimarkis tiom dum la sekvintaj dek minutoj, ke la menciitaj pacemaj pasaĝeroj laŭeble dense kuniĝis sur la prua ferdeko.

La ebriaj secesionistoj estis apenaŭ sur la ferdeko, kiam ili jam estis stariĝintaj ĉirkaŭ ni. Laŭ la ordono de la kapitano ni estis formetintaj la pafilojn.

„Jen li!“ Blyth vokis, la parolinto de hieraŭ, montrante al mi. „Spiono de la nordaj ŝtatoj, kiuj estas sur la flanko de Juárez! Nur hieraŭ li ĉirkaŭiris kiel fajna *gentleman*, hodiaŭ li surmetis *trapper*:ajn vestaĵojn. Kial li maskiĝis? Li mortigis mian hundon, kaj li kaj lia kunulo hieraŭ minacis al ni per iliaj revolveroj.“

„Li estas spiono, jes, spiono!“ la aliaj vokis, unu pli laŭte ol la alia. „La maskado ĝin pruvas. Kaj li estas germano! Definu *jury:on*! Li pendu, nodita je la kolo! Suben la nordŝtatoj, suben la *yankee:oj* kaj iliaj kreaĵoj!“

„Kion Vi faras tie malsupre, *gentleman:oj*?“ la kapitano vokis en tiu momento de supre. „Mi volas trankvilon kaj ordon sur mia ŝipo. Lasu la pasaĝerojn trankvile!“

„Silentu, *Sir!*“ unu el la bando kriegis supren. „Ankaŭ ni volas ordon, kaj ni ekkreas ĝin. Ĉu apartenas al Viaj devoj, lasi spionojn vojaĝi sur Via ŝipo?“

„Apartenas al miaj devoj, transporti homojn, kiuj pagas por la irado. Kiam estroj de la secesionistoj venas al mi, ili rajtas kuniri, same kiel iliaj politikaj kontraŭuloj, sub la kondiĉo, ke ili pagas kaj kondutas dece. Tio estas mia profesio. Kaj se Vi volas malebligi tion, mi metos Vin sur la bordon, kaj Vi devos naĝi al Austin surlande.“

Moka kaj ĉevalbleka ridado respondis al li. Oni kunpelis Old Death:on kaj min tiel forte, ke ni ne povis moviĝi. Ni ekprotestis, sed niaj vortoj estis neaŭdiblegitaj per la besteca kriadado de la kruda grupaĉo. Oni forpuŝis nin de la loko ĝis al la fumantaj kamentubojn, sur kiuj ni estu pendigotaj. Tiuj tuboj havis alte feraj truetojn, tra kiuj iris ŝnuregoj, do bonege taŭgaj iloj pro pendigi iun. Oni nur bezonis malstreĉi la ŝnuregojn, kaj fiksigi nin je la delikata malvastejo de la kolo, pro povi tiam hisi nin senpene.

Old Death devis klopodi per ega forto resti trankvile. Lia mano ofte puŝe ekmoviĝis al la zono; sed tuj, kiam tiam lia vido direktiĝis al la kapitano, tiu kaŝe forrifuzis.

„Nu“, li diris al mi, en la germana, pro ne esti komprenata de niaj premegantoj, „mi volas ankoraŭ obei. Sed kiam ili petoladas tro ege pri mi, ili ekhavos post unu minuto niajn dudek kvar kuglojn en la korpoj. Nur ankaŭ ekpafu, kiam mi komencos!“

„Ĉu vi aŭdas tion?“ la *rowdy* Blyth vokis. „Ili parolas germane. Do estas pruvita, ke ili estas damnendaj *dutchmen*, kaj apartenas al la fiuloj, kiuj pleje endanĝerigas la sudŝtatojn. Kion ili volas ĉi tie en Texas? Ili estas spionoj kaj perfidistoj! Ni rapide agu pri ili!“

Lia sugesto estis kriaĉe konsentata. La kapitano vokis malindulgan admonon al ili, sed refoje estis priridata. Tiam oni ekdemandis, ĉu oni nun procedu kontraŭ la indiano, aŭ pendigu nin antaŭe, kaj oni interkonsentis pri la unua. Blyth forsendis du virojn, pro alvenigi la ruĝulon.

Ĉar ni ĉie estis ĉirkaŭataj de homoj, ni ne povis vidi Winnetou:n. Ni nur aŭdis laŭtan krimon. Winnetou estis terenbatinta unu el la senditoj, kaj ĵetinta la alian de la ŝipo. Tiam li estis irinta en la kabinon de la *conductor*, kiu estis farita el ferlato, kaj troviĝis ĉe la radegingo. Ĝi havis etan fenestron, tra kiu nun elstaris la tubo de la arĝentpafilo. Tiu tuta okazaĵo ĝenerale kaŭzis grandan bruegon. Ĉiu kuris al la relo, kaj oni kriis al la kapitano, ke li sendu homon en la boateton, pro elakvigi la deĵetiton. Hofer akceptis tiun postulon, kaj mansignis al unu el la *deckband:oj*. La viro saltis en la boaton, kiu estis fiksigita je la poba ferdeko de la ŝipeto, lozigis la ŝnuron kaj remis al la spireganta kaj plaŭdanta *rowdy*, kiu povis naĝi nur iomete kaj penis resti je la supraĵo.

Mi staris sole kun Old Death. La pendigado nun intertempe ne plu estis temo. Ni vidis, ke la okuloj de la direktistoj kaj la aliaj ŝipanoj estis direktigitaj al la kapitano, kiu mansignis al ni veni pli proksimen, kaj diris per mallaŭtigita voĉo:

„Atentu, *mes'sur*:oj! Nun mi pretigos la banon al ili. Nur restu trankvile sur la ŝipo, en ĉiuj cirkonstancoj! Sed faru laŭeble multan bruegon!“

Hofer estis haltiginta la ŝipon, kaj la ŝipo naĝiĝis laŭflue, al la dekstra bordo. Tie estis loko, kie la akvo muĝetis super malprofunda terlango. La rivero de tie ĝis la bordo tute ne profundis. Mansigno de la kapitano — la direktilisto ridete kapjesis kaj lasis la ŝipon naĝiĝi al la terlango. Mallonga grinco sub ni, unu puŝo, ke ĉiu ŝancelis, multaj eĉ falis — la ŝipo grundis. Tio direktigis la ĝeneralan atenton de la boato al la ŝipo. La pacemaj pasaĝeroj ĉiuj estis informitaj de la *conductor*, sed ekkriis laŭ interkonsento, kvazaŭ ili estus suferintaj la plej egan mortotimon. La aliaj, kiu kredis al fakta akcidento, kunkriis des pli. La dua *deckhand* ekaperis je la pobo, kuris ŝajne plene je teruro al la kapitano kaj kriis:

„Akvo en la ŝipo, *capt'n*! La rifo disŝiris la kilon rekte meze. La ŝipo sinkos post du minutoj.“

„Tiukaze ni pereos!“ la kapitano vokis. „Saviĝu kiu povas! La akvo malprofundas ĝis la bordo. Rapide enakviĝu!“

Li haste kuris suben de sia loko, deĵetis la veston, la kamizolon kaj la ĉapon, demetis en plej urĝa rapideco la botojn, kaj saltis de la ŝipo. La akvo atingis nun nur sian kolon.

„Suben, suben!“ li kriis. „Ankoraŭ estas sufiĉa tempo. Kiam la ŝipo sinkos, ĝi ŝiros ĉiun, kiu tiam estas sur ĝi, subakven!“

Ke la kapitano estis la unua, kiu estis saviĝinta, ke li antaŭe estis duone nudiĝinta, tio ĉio ne ekpripudigis la secesionistojn. La teruro ekkaptis ilin. Ili saltis en la akvon kaj klopodis laŭeble rapide atingi la bordon, sen atentigi, ke la kapitano naĝis al la alia, de la bordo deturnigita flanko de la ŝipo, kaj resurŝipiĝis per rapide faliginta ŝnurego. La ŝipo nun estis puriginta de la molestaj batemuloj, kaj kie la pura teroro estis reginta antaŭ unu minuto, eksonis nun laŭta, gaja ridado.

Ĵus kiam la unuaj naĝantoj iris sur la bordon, la kapitano ordonis ekvapori antaŭen. La malprofundiĝan, malsupre larĝe kaj stabile konstruita ŝipo ne suferis la plej etan damaĝon. Li facile obeis al la premo de la radoj. Svingetante sian veston kiel flagon, Hofer transvokis al la bordo:

„*Farewell, gentleman*:oj! Se ajn iam refoje endas difini *jury*:on, pendigu Vin mem! Viajn aĵojn, kiuj ankoraŭ estas sur la ŝipo, mi deponos en La Grange. Prenu ilin de tie!“

Facile imageblas, kian efikon tiuj mokaj vortoj havis al la trompitoj. Ili eksonigis koleran kriadon, postulis al la kapitano, tuj repreni ilin, minacis per policanonco, morto kaj aliaj teruriloj, jes, ili eĉ lanĉis iliajn pafilojn, se ili ne malsekiĝis, al la *steamer*, sed sen kaŭzi ian damaĝon. Fine unu transvokis al la kapitano per senpotenca kolero:

„Hundo! Ni atentos vian revenon tie ĉi, kaj tiam ni pendigos vin de via propra kamentubo!“

„*Well, Sir*! Nur venu sur la ŝipon tiutempe! Sed ĝis tiam fartu bone!“

Nun ni havis plenan rapidecon, kaj rapide pluvojaĝis pro regajni la perditan tempon.